1 a Jaro, N-o 23

APERAS S.A.T. SEMAJNE

5. Marto 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: E. LANTY
24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz


Notinda koincido

Antaŭ 20 jaroj, la 9. (22.) januaro 1905, la tuta mondo konstatis, ke en Ruslando komenciĝis la revolucio, ke la monarkismo estas ĉiuflanke atakata de ribelemaj popolamasoj. Tamen neniu alia, nur franca registaro etendis helpantan manon al ŝanceliĝanta trono de rusa caro. Kompreneble franca burĝaro estis gvidata de l'propraj interesoj. Ĝi konsideris rusan carismon kiel liveronton de homa viando por kanonoj en ĉiam okazebla milito inter Francio kaj Germanio. Francaj imperialistoj, forminte pormilitan koalicion kun rusa imperio, autaŭvidis nur agresivajn celojn por permilita frakaso de Germanio.

Tiucele franca burĝaro tiam mobilizis siajn monrimedojn kaj disponigis ilin al rusa registaro por "sanigo" de ruslandaj financoj. Franca registaro helpe de l'financaj potenculoj el franca burĝaro kontakte kun ruslanda ambasadoro en Parizo laŭsisteme koruptadis reptilian ĵurnalaron por krei dezirindan konfidon de pli malgrandaj etburĝoj, kiuj estis inspirataj por investi siajn ŝparkapitalojn en rusaj obligacioj. La tuta afero estis lerte organizita kun vera talenteco. Ĝi atingis la celon, deziritan de franca bankistaro: el la plej malproksimaj lokoj el hejmaj ŝparujoj estis eltiritaj multjare ŝparitaj miliardoj da frankoj kaj disponigitaj al cara registaro de rusa monarkio.

Dank' al tiuj miliardoj la cara registaro povis kaj sukcesis por iom da tempo sufoki la unuan revolucion, — buĉi la venkitajn ribelulojn per amasaj masakroj dum punekspedicioj de fidelaj generaloj, ekzekuti sur eŝafodoj kaj putrigi en malvarmaj ekzilejoj de malproksima Siberio la protagonistojn de ruslanda proletaro.

Nun post 20 jaroj,— kiam Sovet-Ruslando la 9. januaro honoris la memoron pri unuaj martiroj de proletara revolucio, kiuj en 1905 dum paca manifestado estis buĉe dispafitaj de caraj dungitoj sur stratoj de Peterburgo, nun la ĵurnaloj sciigas pri interesaj debatoj en franca parlamento.



MAKSIM GORKI
la granda rusa verkisto, venos Parizon por viziti la Ekspozicion de artoj dekorativaj kun la sovetia delegitaro, inter ili k-do Lunaĉarski, la kantisto Ĉaljapin kaj k-dino Kamenef, fratino de Trocki.

Ne laŭ volo de franca demokratio sed sub influo de franca burĝaro, kies financaj interesoj tiom kruele estis tuŝegitaj de rusa revolucio, okazis tiuj debatoj.

La debatita demando estis, ke ruslandaj laboristoj kaj agristoj, kiuj dum 12 jaroj batalis kontraŭ carismo, pagu al franca burĝaro tiujn pruntojn, per kiuj ĝi helpis rusan registaron por sukcesigi ties lukton kontraŭ la samaj laboristoj kaj agristoj.

Franca ĉefministro Herriot deklaris en parlamento, ke "rekonfirmo flanke de Sovet-Ruslando de ĉiuj rajtoj de francaj posedantoj de rusaj obligacioj estas fundamenta kondiĉo por restarigo de normalaj interrilatoj inter ambaŭ landoj".

Tiu ĉi avizo date koincidis kun supredirita datreveno. Sed tiu ĉi koincido estas nur plia ŝanco por vanigi ĉiujn esperojn de franca burĝaro.

Ruslanda proletaro jure kaj morale estas senrespondeca pri malprofitoj de francaj bankistoj.

Franca burĝaro ne devas forgesi, ke tiutempe, kiam la koruptita ĵurnalaro agitadis por sukcesigo de prunto por Ruslando, la kompetentaj reprezentantoj de socialistaj kaj laboristaj partioj estis avertantaj la publikon pri vera destino de la prunto. Fama viktimo de patriota burĝaro Ĵan Ĵores en siaj elokventaj paroladoj ĉe franca parlamento energie protestis kontraŭ pruntedonoj al cara registaro, ĉar tiu prunto estis necesa tiam por malvenkigo de ruslanda revolucio kaj plifortigo de l'reakcio. Malgraŭ ke tiama carismo ne pagis $^0/_0$-ojn de pli fruaj pruntoj, sed transformis la pagendajn sumojn je novaj pruntoj, la burĝaro estis asertanta ke subvenciado al carismo estas la plej profitdona afero. Franca bankistaro eraris pri siaj esperoj. Malgraŭ malavara helpo de ĝi ruslanda carismo ruiniĝis en uragano de proletara revolucio. La historio, kiu konservis la potencon de rusa absolutismo nur en memuaroj de l'samtempanoj kaj en arkivaj dokumentoj, jam skribis sian objektivan verdikton por financaj helpantoj de Rusa Imperio. "Vanaj esperoj" ĉiam legas en ĝi franca burĝaro, kiam ĝiaj tendencoj koncernas la kompensadon de kapitaloj, iam pruntitaj al rusa caro. Neniu

burĝa juristo aŭdacos aserti, ke por la ŝnuro, kiun uzas la ekzekutisto por pendigi la kondamniton, devas pagi la pendigoto mem. Franca burĝaro, kiu en 1905 perfekte ludis la rolon de l'ekzekutisto, devas lerni ĉe siaj juristoj, ĉar sukcesigita de ĝi prunto estis tiu sufokmaŝo, kiu por 12 jaroj sufokis rusan revolucion.

Ĝi devas kompreni, ke tia komplezo ne estas pagenda de ruslanda proletaro.

N. Krassovski (3637).

La morto ĉe la Ruhr

La Rejnlando-Vestfalia karbmindistrikto, la ĉefa industricentro de Germanio, denove estis scenejo de terura akcidento okazinta la 11. februaro 1925. En la karbmino "Ministro Stein" apud Dortmund estas mortigitaj 136 ministoj pro eksplodo de mingasoj. Kompreneble tio kaŭzis grandegan ekscitojn kaj aflikton ĉe ĉiuj, precipe inter la familianoj de tiuj ministoj, kiuj neniam revidos la sunlumon. Miloj da homoj ĉirkaŭis la minon por esti informotaj pri la sorto de siaj edzoj, patroj, filoj aŭ fratoj. Kvankam ili sciis ke iliaj karuloj kuŝas frakasitaj, malvivaj sub amasoj da ŝtonoj en la profundo de la mino, ili tamen esperis je io malebla, kio povus redoni al ili la karulojn. —

De tempo al tempo trakuras la mondon sciigo pri grandakcidento en karbmino, sed ĉiam post kelkaj tagoj, tiuj viktimoj de la kapitalista sistemo estas forgesitaj. Ke kulpa estas ĉi sistemo, mi mem ofte spertis. Nur pro konstanta pelado, tial ke al la ministoj mankas tempo por observi ĉiujn danĝerajojn subterajn, tial ofte okazas akcidentoj. Sub la premado de senindulgemaj sklavestroj laboras en Rejnlando-Vestfaliaj minekspluatejoj pli ol 400000 ministoj en mizeraj cirkonstancoj por malalta salajro.

Laŭ miaj spertoj la ministaro ne estas kapabla liberigi sin, ĉar plej grandparte ili estas pro longdaŭra subtera laboro pli sklavigitaj kaj indiferentigitaj ol aliaj metiistoj surtere okupitaj. Dum la pasintaj jaroj estas rimarkebla rezignemo inter la ministaro, certe pro la troa subpremado aŭ pro timo esti senlabora aŭ lokaŭtota. Sed ne ĉiam estis tia stato, ĉar de tempo al tempo okazis strikoj por atingi malplilongan labortagon, por plialtigi la salajron ktp. ekz.: en la jaroj 1905, 1912, 1919 kaj 1920. Ke per ĉi bataloj nur malmulto estas atingita, tion kulpas la malunueco de la ministaro dividita en tro multe da organizaj direktoj kaj la multo da neorganizitoj. Anstataŭ batali komune kontraŭ la komuna malamiko, la kapitalismo, la diversaj minfakunioj reciproke agis malsolidare. Ĉi malunueco estas kvazaŭ nigra makulo en la historio de germanaj ministoj.

Konsiderante statistikon pri akcidentoj en la minoj de Rejnlando-Vestfalio oni povas konstati teruran staton. Laŭ ĉi statistiko akcidentis en jaro 1924 65000 ministoj. El ĉi nombro akcidentis dum la lasta duonjaro 360 ministoj kiuj tuj mortis kaj 37000 estas grave vunditaj. Tio deyenas de la lasttempe aprobita pelsistemo de la monavidaj kapitalistoj.

Se la lasta grandakcidento en Dortmund ne vekos la ministaron, tiam oni ne esperu ke la ministaro baldaŭ vekiĝos el sia letargio. *Ruhr-karbministo (2295.)*

Letero el Argentino

La regiono de Juncal (elp. Hunkal) estas preskaŭ nur agrikultura, se oni esceptas kelkajn, kiuj sin dediĉas al bestbredado (bestkulturado). Ĉi tie oni terkulturas per tute modernaj iloj, do, la agrikulturado estas ampleksa, vasta, kio favoras la terkulturistojn. Ili nun, ĝenerale, bonstatas. Ne tiel la kamplaboristoj, kiuj laboras tre multe kaj estas pagataj mizere. Ili laboras, dum ĉi tiu sezono, de la frua matenhoro (de la 5a, sed leviĝas pli frue por iom engluti kafon, teon aŭ herbomaton) ĝis la lumo de la tago estingiĝas. Nur la laboristoj kiuj malŝarĝas la ĉarojn, kiuj venas al stacidomo, kie estas instalitaj la grentenejoj, ŝarĝitaj per sakoj da greno, kaj kiuj poste enŝarĝas la vagonojn, kiuj estas kondukitaj poste al haveno de la urbo Rosario, nur ili laboras ok horojn potage kaj ricevas pagon da pes. 9(naŭ) eĉ 10(dek) potage. La manĝaĵo estas abunda, sed konsistas nur el viando kaj pano. Matenmanĝo, ĉirkaŭ la sepa horo, konsistas el herbo-mato (simila al teo) pano, rostita aŭ fritita viando, anstataŭ tio ofte fromaĝo aŭ kolbasoj, tagmanĝo el tiel nomata "Puchero" (elp. Puĉero): kuirita viando kun kelkaj terpomoj, iom da pasto aŭ rizo, sed ne ofte rizo, ĉar ĝi kostas pli ol pastoj (supopastoj, vermiĉeloj), vespermanĝo el "Guiso" (elp. Gizo, speco de stufaĵo). Da pano ili povas manĝi kiom ili volas, sed se ili volas trinki vinon, ili devas pagi. Ili dormas, kuŝiĝas, ne pli bone ol la bestoj mem, surtere, eĉ la kovriloj mankas, ili sin kovras per sakoj. Multaj bestoj havas pli konvenan kuŝejon, pli higienan kaj pli komfortan ol la laboristoj. La laboroj kompreneble estas diversaj, sekve la pago ankaŭ varias, de pes. 1.00 papermono ĝis 4.00 potage kun manĝado, sen vino, aŭ pomonate pes. 25.00 ĝis pes. 60.00. Dum la abunda rikolto ili gajnas iom pli, ĉar ĝenerale tiam la kamparanoj pagas popece (tiom po Quadra, elp. Kvadra, enlanda mezurilo 16,874 m²). La prezoj varias laŭ la bona aŭ malbona rikolto, de pes. 1.20 ĝis pes. 4.50 po Quadra, la abundeco de laboristoj aŭ manko de ili influas ankaŭ la prezon. Oni povas finrikolti, ekzemple de tritiko eĉ ses Quadras (Kvadrojn) potage. Tiu laboro daŭras de dek ĝis dudek tagoj. Ĉi tiun jaron, pro la daŭra sekeco kaj pro poste okazintaj malfruaj frostoj, la rikolto de greno, tritiko, hordeo, aveno kaj lino ne estas bona; de lino ĝi eĉ estas tute malbona. Sekve la prezoj por laboristoj estis malaltaj: pes. 1.70 po Quadra aŭ pes. 6.00 potage, kun manĝaĵo, vino ankaŭ dum la rikolto de tritiko, lino, ktp. Ne ĉiuj kapablas plenumi tiun laboron, do multaj vagadas piede, kun ŝarĝo surdorse (kiu konsistas el iliaj vestoj kaj aliaj utilaĵoj), de vilaĝo al vilaĝo, serĉante iun ajn laboron, okupon, por iu ajn prezo. Nek la maizo donos abundan rikolton, ĉar ankaŭ ĝi suferis, kaj suferas eĉ nune, pro la sekeco; la neatenditaj frostoj en la unua duono de la monato decembro grave danĝerigis ĝin, kaj ankaŭ la akridoj nun danĝerigas ĝin. La rikolto de maizo okazas dum monatoj aprilo, majo kaj junio, eĉ julio ankaŭ. La prezoj de la ĉefaj vivnecesaĵoj estas: viando pes. 0.55 po kilogramo, pano pes. 0.35, sukero, pes. 0.65, herbo-mato pes. 0.90, kafo pes. 2.30, lakto pes. 0.15 po litro, vino pes. 0.50 po litro (en papermono). Manĝado mizera, kun dormado, en restoracioj pes. 2.50, en pli bonaj hoteloj pes. 4.50 po tago. *Satano 1933.*

Letero el Bulgario

El la ĵurnaloj vi eble scias, ke la ministra prezidanto de nia lando vizitis Belgradon kaj Bukareŝton, por fari kontrakton kaj ligon kun tiuj ŝtatoj kontraŭ la bolŝevista danĝero — kontraŭ la balkana proletariaro. Ĉu tiu ligo havos sukceson aŭ ne, tion montros la estonteco.

La registaro nenion volas scii pri la malsato kaj la terura kareco en la lando. Nur la situacio de kelkaj senfeligistoj kaj eksportistoj estas bona, sed por la proletariaro, kiu sentas la frapojn de l'malsato, la vivo estas nepriskribeble terura. Sed kion oni faru, kiam ne estas permesataj laboristaj kunvenoj nek laboristaj ĵurnaloj? De kie ni ricevos helpon?

Pli ol 500000 homoj estas ekzilitaj, forpelitaj de siaj hejmoj per la najbaraj faŝistaj regadoj el Makedonio, Trakio kaj Dobrudja. Ili ankoraŭ dumvivas en vagonoj pro manko de domoj, senlaboraj. Kaj eĉ plie ĉar ĉi tie estas multaj rusoj (emigrantoj), kiuj laboras kun pli malgranda salajro, kaj tiuj 500000 senhejmuloj ankaŭ efikas je plia malaltigo de salajroj de la laborantoj kaj pliakrigas krizon de senlaboreco, — la mizero eĉ pli forte sentebliĝas. Sed tiu situacio favoras la fabrikistojn kaj senfeligistojn, ĉar la laboristoj ne povos striki.

La malsato plifortiĝas de tago al tago. Nia lando havis sufiĉajn nutraĵojn, sed la senfeligistoj eksportis ilin por 7 levoj po kilogramo por plibonigi la kurzon de nia mono. Sed kiam oni vidis, ke malsato atakis nian landon, tiam la faŝista registaro malpermesis la eksporton. Sed tio okazis tro malfrue. Por trankviligi la popolon, la samaj senfeligistoj anoncis per la tagĵurnaloj, ke malsato ne okazos, ĉar oni prenis antaŭzorgojn.

Ili aĉetis grenon de Jugoslavio, Rumanio, eĉ de Argentino, sed ne por 7 levoj, sed por 9—10 levoj po kilogramo. Tiel prenas antaŭzorgojn nia faŝista registaro, ne por la amasoj, sed por kelkaj senfeligistoj. Sama estas la historio pri bulbo, kiu antaŭe estis aĉetebla por 3—4 levoj po kilogr., sed nun kostas 12—14 levojn.

Ili nur serĉas, kie trovi komunistojn, por mortigi ilin. Antaŭ kelkaj semajnoj mi ricevis leteron de konatulo el Ŝumeno, kiu skribis al mi, ke tie okazis multaj arestoj de gelernantoj. La kaŭzoj de ilia aresto estas: ke ili dum unu semajno faris promenadon kaj fotografis sin. Unu bildo falis en manojn de la policistoj, kaj ili ekpensis, ke ili nepre estas komunistoj, kaj kaptis ilin. La policistoj batis ilin, tenis malsataj kelkajn tagojn en malvarmaj ĉambroj kun rompitaj fenestroj, nur por ekscii ion de ili, sed nenion ili eksciis. La konduto de policestro estis tre malbona kaj malĝentila kontraŭ la lernantinoj.

Post tiuj arestoj, la policistoj arestis multajn ekskomunistojn, kiuj nun estas neŭtralaj, en unu malgrandan ĉambron ĵetante proksimume 50 personojn, tiel ke ili ne povis turni sin, kaj dormis starante dum la nokto. Ankaŭ al ili ne estis permesite iri eksteren por urini. Ili urinis de el unu rompita fenestro, kiu estis tre alta. Eĉ unu advokato, kiu ne povis urini de tie, urinis en sian galoŝon kaj metis ĝin tra la fenestro.

Antaŭ 5 tagoj estis sieĝitaj en unu domo en Sofio du personoj (vidu rap. en no. 20-Red.). La domo estis ekbruligita, kaj la kamaradoj brulmortis. Oni supozis, ke ili estis mortigintaj unu policiston. Sed tio ne estas vera. Sama estas la historio pri malkovrita nelegala komunista presejo, kie estis mortigita unu laboristo.

Ĉiutage la ĵurnaloj nepre anoncas po kelkajn mortigojn al laboristoj. La vivo ne estas sekura, kaj multaj junuloj jam forlasis la limojn de l' lando. — Multaj laboristoj estas en malliberejoj, kaj iliaj familianoj estas sen subteno. Subtenu ilin! Kaj protestu kontraŭ tiu faŝista regado!

Oreolov.

TRA LA KLASBATALO

Post la buĉado de laboristoj dum la demonstracio 10. febr. en Praha, la indignitaj masoj faris 15. febr. grandan protestdemonstracion, kiu efektiviĝis spite la polican malpermeson kaj policanan kontraŭagadon. Pro la kreskanta plikariĝo de la vivo la laboristaro estas en stato de maltrankvilo kaj eksciteco.

La angla registaro decidis, resti ĉe la nuna sinteno kontraŭ la Sovet-Unio kaj ne elekti ambasadoron por Moskvo.

Germanio pagis ĝis nun 394,5 milionojn da markoj laŭ la Dawes-traktato.

En la komunumaj balotoj de Turingio (Mez-Germanio) la burĝaj partioj pliboniĝis siajn poziciojn.

En Bulgario la blanka teroro plufuriozegas. Multaj novarestoj okazis kaj mortkondamnoj de laboristoj.

En la granda antikomunista proceso antaŭ la Ŝtattribunalo en Leipzig la akuzanta estraro provas per ĉiuj rimedoj de bruta perforto senigi sin de la defendanta advokatato.

La 22. febr. okazis en Magdeburg demonstracio de la germanaj respublikanoj, organizitaj en "Regna Standardo"; samtage en Leipzig demonstracio de la Ruĝaj Frontbatalatoj kun protesto kontraŭ la ŝtattribunala klasproceso.

Ekonomiaj ciferoj el Italio

	Indeksaj ciferoj					
	de la cirkulanta papermono	de la prezo de la ora mono	de la pograndaj varprezoj en paperaj liroj	de la pograndaj varprezoj en oraj liroj	de la vivkosto	de la salajroj
1913—1914	100	100	100	100	100	100
1921 I duonjaro	772	460	551	120	560	540
1921 II	760	455	525	115	522	520
1922 I	751	389	517	133	503	515
1922 II	751	430	542	126	498	505
1923 I	716	401	539	134	495	480
1923 II	727	442	531	120	493	476
1924 I	713	443	545	123	517	474
1924 II	745	444	562	127	538	480
1924 decembro	745	449	593	132	580	485

Tabelo eltirita el artikolo de prof. Georgo Mortara, citita en artikolo de prof. L. Einaŭdi en la burĝa ĵurnalo "Corriere de la Sera" de Milano de 22. jan. 25.

El tiu ĉi tabelo oni vidas, eĉ laŭ la tute burĝa artikolverkinto, ke "ĝis la fino de 1922, vivkosto kaj laboristaj salajroj estis en kvazaŭa ekvilibro: kaj la tiatempaj laboristmovadoj (strikoj ktp.) nur celis konservi tiun ekvilibron". (Sed tiel ne skribis tiutempe prof. Einaŭdi!) "Sed poste la salajroj malaltiĝis" (pro la perforta ruinigo de la laboristaj kunligoj ktp.) "Kaj la vivkosto plialtiĝis, precipe pro la altiĝo de la hejm- kaj panprezoj."

Reĝustigo kaj kompletigo

En n-o 19 (5. febr. 1925) de "Senn." aperis raporteto pri la persekutoj, malliberigoj lastatempe okazintaj, resume pri la faŝista teroro furiozanta. Sed tiu ĝenerala skizo de situacio rumanlanda ne estis dediĉata al la SAT-anaro, nur pro malkompreno estas enpresita en S. La afero tiel staras, ke mia Leipzig'a korespondanto ricevinte de mi pseŭdonime signitan leteron (kiun mi signis pro singardemo pseŭdonime), verŝajne pensis, ke tiu letero estas represenda en S. — Mia malliberigo estis nur provizora kaj similaj malliberigoj pluraj okazas nuntempe, do tiu okazintaĵeto absolute ne estis inda por represo [1]). Ĉi-tiom por reĝustigo.

Por kompletigi la jam aperintan raporton, mi aldonas jenajn sciigojn:

La persekutoj "iomete" malvigliĝis, sed la esploroj ankoraŭ daŭras. Multajn kamaradojn kaj kamaradinojn la "siguranta" (speciala policorgano, kies fifamo eĉ trans la limoj estas konata) liberigis, sed la postsignojn de la konfesigo ili kunportis — surhaŭtigite. La esp-istoj ankaŭ estas liberaj. La "ĉefkrimuloj" estas jam forportitaj en fortikaĵo-karcero de Jilava apud Bucuresti. La procesoj komenciĝos nur, se la "tuta materialo" estos kolektita rilate ĉi "komploton kontraŭŝtatan"!

Sed dume la politikaj kaj ekonomiaj krizoj furiozas tra la tuta lando, la aro de senlaboruloj de tago al tago pligrandiĝas. Meze de urboj la luksego diboĉas, orgias, kaj ĉe la periferioj la mizerego mortigas la vicojn de l' proletoj.

"Sennomulo".

1) Ni opinias male, ke ĝuste tiaj personaj impresoj kaj travivaĵoj taŭgas por S., se ili verfakte respegulas ĝeneralan staton en iu lando. — *Red.*

Louise Michel

Dum januaro 1905 mortis nia kuraĝega kamaradino Louise Michel. Jam kelkaj semajnoj pasis depost la datreveno, sed ne ŝajnas al ni tro malfrue por rememorigi al niaj amikoj la noblan konsciencon de tiu virino.

Ni anarkistoj ne kutimiĝas krei idolojn el homoj kaj kurbiĝi antaŭ ili, ankaŭ mi tion ne faras hodiaŭ. Sed sur la socia batalkampo kelkaj individuoj pro plej absoluta ofero meritas nian emocian respekton kaj memoron.

Longa skribaĵo pri Louise Michel ne tiel valorus kiel la publikigo de ĉi-suba letero [1]) en kiu ŝi mem klare esprimas siajn pensojn kaj idealon.

"Kial mi estas anarkistino?

Mi estas anarkistino tial, ke neniu alia ideo celas tute al egaleca justeco kaj feliĉo de la homaro.

Estas hodiaŭ minimumo de progreso atingenda, kaj kiam ni estos ĝin atingintaj, ni ekvidos limojn de alia horizonto kiun ni same trafos por malkovri alian, kaj tiel ĉiam, ĉar la progreso estas eterna.

La homo estos inteligenta kaj bonkora nur kiam li estos libera; nur Anarkio estas libereco.

Tuj poste kiam la homoj alprenis la potencon, ili koruptiĝas aŭ malspritegiĝas; aliparte la obeantoj same malnobliĝas. Neceseco por homaro elstari for de l' terura mizero en kiu ĝi ĉiam vivis devigas al ago ti-kiuj sentas en si homan koron dum la batalo por libereco. Alproksimiĝas la horo plifruigita de l' krimoj de grandnombraj regantoj, kaj iliaj defendrimedoj ne malhelpos la milionojn de malfeliĉuloj rifuĝi en Anarkio same kiel la hirundoj forkuras al pli milda klimato, kiam alvenas la mortigonta vintro. Ĉiu estulo volas vivi, ĉiu raso ankaŭ, kaj la nia malaperus en malfortiĝo kaŭzita de mizero kaj laboro, se la nunaj cirkonstancoj ne baldaŭ ĉesus.

Anarkio estas renoviĝo kiun nenio povas malhelpi. La despotaj institucioj falruiniĝas, la amaso ĉiam ampleksas kaj formos kvazaŭ marmoregon kiu kovros la malnovan mondon. La ŝtonaĝo devige malaperis, la nia nepre malaperos.

La rega potenco, la aŭtoritato, la privilegioj baldaŭ fariĝos armiloj tiel senutilaj kiel la ĵetlancoj aŭ la ŝtonjetiloj de la sovaĝuloj, ĉar jam depost longe sen alpreni la nomon, eĉ senkonscie, ĉiuj pensuloj, ĉiuj artistoj estas anarkistoj, la mondo estas antaŭprenita, la forpreno estas surprizo nur por la brutuloj.

Mi fariĝis anarkistino irante al Nov-Kaledonio, sur la ŝtata marŝipego kiu nin kunportis en kaĝoj kiel tigroj (oni esperis nin pentigi). Tie, inter la ĉielo kaj la akvo povante nenion fari, ni pripensis.

1) Tradukita kun permeso de la posedanto, filo de la ricevinto.

Nu! ĉar mi jus estis vidinta niajn amikojn de la Komuno[1]) honestaj, bravaj, sindonemaj, senkapabliĝi en regado, tiamaniere, ke la Komuno ĉiam timante fari malbonon, montriĝis energio nur en defendo kaj morto, mi bone konsciis, ke anstataŭi malbonajn homojn per aliaj homoj eĉ revoluciaj kaj bonaj, ŝanĝas nenion al la sklavigo de la plejmulto. Ni devas batali ne nur kuraĝe sed ankoraŭ logike, kaj la logiko postulas, ke la popola plejmulto fine profitu de revolucioj. Sufiĉe longe ĝia sango surverŝis la teron por ke ĝi fine ricevu la rikolton."

Londono, 1. febr. 1895. Louise Michel

SAT-anino 2198

Strikoj en privataj entreprenoj de Sovet-Unio

Revzin

Ekonomia konsumo de l'lando, kiu rezultis pro imperialisma kaj civita militoj, taskigis al sovetpotenco restabiligon de produktivaj fortoj de lando. Ĉi tasko estis la plej grava kaj ĉefa. Al tiu restabiligo, komencita per efektivigo de nova ekonomia politiko, ni allogas ankaŭ privatan kapitalon per farmigo al ĝi de malgrandaj kaj mezegrandaj entreprenoj kaj ankaŭ per disponigo al ĝi de rajto konstrui proprajn entreprenojn. Sur tiu grundo dum la jaroj de nep (nova ekonomia politiko) kreskis kaj disvolviĝis miloj da malgrandaj privataj entreprenoj kun apliko de dungata laborforto, kiu nuntempe sumas proksimume 3—4 % de tuta kvanto de industriaj laboristoj en Sovet-Unio.

Disvolviĝo de privata kapitalo, malgraŭ mallarĝa sfero de malgrandaj entreprenoj, metis antaŭ profunioj la taskon defendi ĉiuflanke kaj ĉiumetode ekonomiajn interesojn de laboristoj en ilia batalo kontraŭ kapitalo. Ĉi lukto ne malofte akceptis akrajn formojn de l'striko, gvidata de profesiaj unuiĝoj.

Dum strikoj en privataj entreprenoj okazis daŭraj klaskonfliktoj sur grundo de profunuiĝa defendo de laboristaj ekonomiaj interesoj; ĉi konfliktoj en cirkonstancoj de soveta ŝtato, dank' al gvidado de profunuiĝoj kaj persisteco de laboristoj, finiĝis en plej granda kvanto da kazoj per venko de laboristoj. En tiu sfero ni do povas noti sufiĉe grandajn sukcesojn.

Analizante strikmovadon en privataj entreprenoj, ni vidas intensan kreskadon de la strikoj kaj ĉiam pligrandiĝantan persistecan karakteron de ili, kio atestas akran lukton inter laboro kaj kapitalo.

Se en 1922 j. la kvanto de registritaj strikoj en privataj entreprenoj estis 99 kun la kvanto de partoprenintaj laboristoj 4800, do en 1923 j. relativaj ciferoj estis jam 135 kaj 5200[2]).

Se ni esplorus la nombrojn de perditaj "homo-tagoj" dum la strikoj en privataj entreprenoj, ni vidus, ke en 1922 j. estis 15206, en 1923 j. jam 25067, kaj dum unua duonjaro de 1924 j. 13309.

Ankoraŭ pli mirigajn ciferojn ni havas, kiam ni esploras la nombron de perditaj homo-tagoj por unu striko. Tiu nombro estis 1922 j. 165 da homo-tagoj, en 1923 j. — 191, kaj dum unua duonjaro de 1924 j. — 325. Samtempe preskaŭ 50 % da strikoj havis dum ĉi jaroj daŭrecon da pli ol 5—10 tagoj meznombre, variante malmulte en tiun aŭ alian flankon. Entute ĉi-kaze estas proksimiĝo al ĝisrevolucia daŭreco de ekonomiaj strikoj, kiu laŭ Stopani estis iom pli granda, ol 5 tagoj meznombre.

Esplorante la kaŭzojn de strikoj en privataj entreprenoj, ni vidas treege instruivan bildon.

Montriĝis, ke pli ol 50 proc. da strikoj dum 1923 kaj 1924 okazis pro rifuzo de privataj entreprenistoj pri faro aŭ efektivigo de farita kolektiva labortrakto.

Tio signifas, ke privataj entreprenistoj obstine kaj krueligite ne volis agnoski la rajton de laborista kaj de profunuiĝa kontrolo kaj partopreno en difino de kondiĉoj kaj pripago de laboro en entrepreno. Ĝi signifas, ke privataj entreprenistoj, restinte fidelaj al sia naturo, volis kaj volas senkontrole, arbitre kaj nelimigite ekspluati laboristojn, ne dezirante atenti profunuiĝon. Sur tiu grundo ne malofte okazis, ke privata entreprenisto provis deŝiri laboristojn de profunuiĝo, provokante ilin per ia fipago por rifuzo de profunuiĝa defendo. Sed ĉi tio ne prosperis kaj ne prosperas al ili. La persisteco de laboristoj, ilia klaskonscio, kaj iafoje nur klasinstinkto ebligis al profunuiĝoj sukcese refuti ĉi provojn kaj per obstina striklukto devigi privatajn entreprenistojn akcepti kolektivan labortrakton, efektivigi ĝin kaj ankaŭ agnoski profunuiĝon.

Certe, kiel kaŭzoj de strikoj estis ankaŭ memstaraj postuloj je plialtigo de salajroj, sed tutan nombron de ĉi-specaj strikoj estas malfacile difini ĉar kutime la postuloj pri plialtigo de salajroj estis direktataj al entreprenistoj samtempe kun kolektiva labortrakto.

Interese estus noti, ke ĉiujare preskaŭ 25 % da strikoj komenciĝis sur bazo de malĝusttempa pago de salajroj.

En ĉi kazo ni ne povis havi influon kaj premon ti-kiun faras helpe al profunuiĝoj la kompartio kaj sovetpotenco sur ŝtatajn organizaĵojn en afero de ĝustatempa pago de salajroj.

Kun helpo de partio kaj sovetpotenco kaj pro penemo de mastrumaj organizaĵoj mem ni en ŝtata industrio preskaŭ tute forigis malĝusttempeceon de salajropago. En privata industrio ni do havas antaŭ ni klasan malamikon, kiun per persista lukto laboristoj sub gvidado de profuniĝo devigas pagi salajron.

Fine, gravas noti, ke dum 1924 j. (temas ĉie nur pri unua duonjaro de 1924) ni havis ĉirkaŭ 10 proc. da strikoj kaŭze de maldungo de laboristoj. La procento de tiaspecaj strikoj pligrandiĝis kompare al 1922—1923 du-trioble. Ĝi ankaŭ asistas ĉiam pligrandiĝantan obstinan lukton tikiun profunuiĝoj procedas kontraŭ privataj entreprenistoj defendante la interesojn de laboristoj.

En la strikoj sur tiu bazo antaŭ ni reaperas malnovaj ĝisrevoluciaj bildoj, kiam entreprenanto per maldungado penis forigi maldezirindajn por li laboristojn. Sed nun tio estas jam malpli facila. Ekzisto de fortegaj profunuiĝoj en cirkonstancoj de soveta ŝtato ebligas al laboristoj, troviĝantaj en privataj entreprenoj sukcesan defendon de siaj interesoj kaj rajtoj. Tion oni pli bone vidos, se ni esploros rezultojn de strikoj.

Laŭ rezultoj strikoj dividiĝas jene:

	Gajnitaj de laboristoj Entute	Parte	Malgajnitaj de laboristoj
1922 . .	78.0	13.2	8.8
1923 . .	76.7	11.3	12.0
1924 . .	66.7	23.8	9.5

Tiamaniere ni havas entute pli ol 2/3 da strikoj gajnitaj de laboristoj. Sufiĉe granda kvanto estas gajnita parte (13 ĝis 23 proc.). En neniu, eĉ plej demokratia, kapitalisma ŝtato ni havis ion similan. Tio estas klara por ĉiu laboristo.

Tamen, ni ne devas malatenti, ke ni havas ĉirkaŭ 10 proc. da tute malgajnitaj strikoj. Ni devas atenti klariĝintan tendencon de malpligrandiĝo de tute gajnitaj strikoj. La strikoj fariĝis pli obstinaj, ilia kvalito, rilate al aperigo de klasaj kontraŭecoj, fariĝis pli alta, la lukto fariĝis pli malsimpla.

La malgajnitaj strikoj ĝenerale rezultis pro ilia nepreparitec o, pro malĝusta opinio pri cirkonstancoj, aŭ pro malserioza rilato al la striko entute. Similaj kazoj estis. Estis provoj deklari strikon per nura decido de unuiĝo, sen atento de la spiritstato kaj sen antaŭpreparo de laboristoj. Ĉi strikoj finiĝis ne malofte per malsukceso kaj neniigo de profunuiĝa aŭtoritato. Kontraŭ similaj strikoj oni devas decideme lukti.

Elrusigis *Eug. Sulje* (248)

(laŭ "Pravda" de 6. febr. 25).

1) Ribelego en Parizo 1871, al kiu aktive partoprenis Louise Michel.

2) Laŭ statistiko de centra oficejo de laborstatistiko. Laŭ sama statistiko estas donitaj ĉiuj aliaj ciferoj en la artikolo.

KORESPONDEJO

Al ĉiuj. Ni petas raportetojn koncizajn por la fako "Kroniko", por ke ni povu doni informojn el tuta mondo pri stato de la esp. lab. movado. *Red.*

3805. Ni uzos vian alvokon-tradukon nur okaze de bezono.

2135. Okaze ni uzos la manuskripton.

1242. Ni uzos viajn notojn okaze.

H. Ŝ. L. Vian artikolon pri signifo de esp. ni ricevis. Tamen, la ideoj jam estas tro konataj al SAT-anaro. Do ni ne povas represi. *N. B.*

SAT-MOVADO

La edukado-taskoj de sennaciulo

Nia epoko estas epoko de grandegaj reformoj kaj revolucioj.

La granda ŝanĝo de l'sociaj klasoj ĉe la direktiloj de kelkaj landoj de l'mondo faris multsignifan puŝon antaŭen laŭ progresa linio en ĉiuj sferoj de l'vivo, scienco, tekniko kaj ideologio de l'sociaj amasoj.

Por ni, sennaciuloj, precipe malfremda estas la renaskiĝanta en novaj formoj edukado de l'estontaj membroj de l'altekultura homaro.

La falantaj fortikajoj de naciaj interesoj kaj anstataŭantaj ilin klasaj interesoj forviŝas la limojn de l'regnoj kaj larĝigas ĉirkaŭrigardon de ĉiu pensanta homo, ekinteresiĝinta pri sorto de l'estonta homaro.

Niaj nuntempaj gazetoj, spite la eksterajn titolojn: "En la fremdlandoj", "En nia lando", "Ĉe ni", prezentas laŭ sia interna enhavo plenan nedisigitan vivon de l'homaro, kiun ligas multaj komunaj interesoj, komunaj celoj kaj taskoj. Ofte okazas, ke preskaŭ tutaj paĝoj multkoloras per sciigoj pri plej aktualaj demandoj de la tutmonda vivo.

Nun ni jam maloftege povas trovi iun ajn fosiliulon, kiu vivus nur per siaj hejmaj interesoj. Eĉ la plej ekstrema konservatulo, naciulo, ŝovinisto avidege legas diversajn informojn el-post la limoj — ili vivas per aktualaj tutmondaj demandoj,

Antaŭ la SAT-anoj leviĝis en plena kresko la demando pri nova edukado kaj klerigado de nia juna generacio. Nun ni devas forĝi ne plu civitanon de iu lando, sed anon de l'tuta mondo. Krom tio, por esti adepto de la interklasa batalo, defendanto de interesoj de la popolamaso — proletaro — ni devas forte kaj rapide maldekstrigi la direktilon, jeti malaman rigardon la limojn de l'regnoj kaj ĉirkaŭpreni per larĝa rigardo la senfinajn malproksimajn de l'horizonto — fariĝi veraj sennaciuloj.

Niaj infanoj tiam en niaj manoj elkreskos anoj de l'monda socio, en kiu regos interkomprenado sen peruloj, komunikiĝado tute libera kaj klasaj unuiĝoj en grandega mezuro.

Diversaj "Internacioj" efektive fariĝos organoj de unuiĝoj de siaj anoj. En tiuj internacioj la lingva diverseco estas nuntempe la plej terura malhelpilo por interproksimigi la anojn al la popolamaso.

Kaj antaŭ ni, sennaciuloj kuŝas grandega tasko de edukad-laboro.

Ni devas niajn infanojn allogi al la internaciismo, konvinki pri neevitebleco de akcepto de komunikiloj en ĉiuj sferoj de l'vivo.

La homaro posedas unu solan sciencon en la sfero de l'tekniko, ekonomiko, ĝi preskaŭ nuligis la grandegajn distancojn per disvolvo de l'vojoj, konkirinte eĉ la aeron, per disvolvo de l'skriba kaj buŝa komunikiĝo, utiliginte la poŝton, telegrafon, telefonon ĝis neekzistintaj mezuroj.

Sed bedaŭrinde mankas viva komunikiĝo. Ni homoj de diversaj nacioj malgraŭ nia proksimo, kunveninte, stulte rigardas unu la alian kaj deturniĝinte, disiras flanken, kiel tute fremdaj homoj.

Necesas montri al la infanoj la tutan malnaturecon de tiu ĉi situacio kaj laŭgrade paŝopost-paŝo, eduki en ili konvinkojn, proksimajn al niaj SAT-anaj perceptoj.

Unuvorte por la SAT-anoj ne estas sufiĉe da ordinara laboro en propagandado de nia ideo, necesas sistema longtempa pedagogia laboro pri edukado kaj instruo de l'infanoj.

Tiu ĉi sola laboro, eĉ sen instruo pri la lingvo mem, jam estas celkonforma laboro de esperantisto, laboro de moviganto de l'monda progreso. Poste al tiuj infanoj sufiĉos ekhavi malgrandan eksteran impulson, por fariĝi vera SAT-ano, ĉar ellerni la lingvon por li konvinkita en la ideo kostos tre malmulte: la interesiĝo estas la plej fidela movilo.

Nia socia agado devas akcepti la saman direkton: necesas prepari la sociamasojn al la fakta komunikiĝo, disvolvi en ili intereson al senpera komunikiĝo, konvinki ilin en la valoro ne de papera proksimeco, sed de la rekta, senpera: la plej bona rimedo por komunikiĝo devos fariĝi ĉe ili la radio-telefono kaj parollingvo.

Sed kiel tiu, tiel la alia postulas akcepton de internacia lingvo.

Per tio la unua stadio de la tasko de esperantisto-propagandisto estas farita.

Tia estas ideologia flanko en la pedagogia laboro de sennaciulo.

Efektivigo de niaj ideoj en la vivo estas tasko de la estontaj socianoj, kaj ni — sennaciuloj — estas edukistoj de tiuj homoj.

Ni devas fiere porti nian standardon verdruĝan kaj esti avangardo en la movado.

N. Ŝevĉugov, Omsk.

Kiajn rondojn laborulajn ni devas akceli?

Tre grava estas por ĉiu SAT-ano la problemo — inter kiuj rondoj ĉefe gvidi sian laboron, kiujn kategoriojn de laboruloj speciale akceli per sia porklasbatala uzo de esperanto.

La burĝaro estas difinite forpuŝita de nia regularo. Sed ankaŭ inter la laboristoj estas ja diversaj grupoj: la laboristoj intelektaj (en senco plej vasta), industrilaboristoj kaj eĉ manlaboristoj.

Tiu problemo pri prefero de iuj rondoj speciale konvenaj kaj favoraj por la peresperanta porrevolucia laborado — estas speciale akra en Sovetio.

Verŝajne estos interese ankaŭ por la kamaradoj eksterlandaj — ekscii ion pri la konsideroj de sovetlandaj esp-istoj tiurilataj.

Lastatempe aŭdiĝis proponoj pri speciala laborado inter la profesioj de inteligentaj laboruloj: poŝtistoj kaj instruistoj unuavice.

Oni eĉ tendencis pli kategorian decidon — labori nur ekskluzive en tiuj medioj, zorgi nur, ke tiuj kategorioj de laboruloj uzu kaj praktike apliku nian lingvon.

Estis konsideroj, ke laboro esperanta inter aliaj profesianoj — ĉefe inter industri- kaj manlaboristaro — estas nenecesa kaj malutila — same de politika klasbatala, kiel de esperanta vidpunkto.

Nature laborulon politike kaj socie analfabetan, oni devas instrui ne pri esperanto, sed pri certaj elementoj de politika scio. Same oni devas unue konigi al laborulo lian propran lingvon kaj nur poste esperanton. Tio estas natura kaj komprenebla postulo de prudento kaj racio.

Tamen esperanto devas esti disponigata al uzo de ĉiuj laboruloj — por iliaj internaciaj bezonoj. Analfabetajn intelekte kaj socie laborulojn ni ne celos kaj ili ja ankaŭ ne venos al ni. Sed ni vidas multajn laboristojn kun larĝa mondkoncepto kaj evoluanta intelekto, kiuj celas ekposedi la internacian lingvon. Ili estas multaj en Sovetio. Despli multaj ili estas en eksterlando.

Tiujn laboristojn ni devas tiri al nia rondo, konduki en nian laboron.

Se ni ne pensos pri tio — nia organizajo riskos degeneri kaj perdi vivajn ligojn kun la kerno de la laborista klaso: — industri- kaj manlaboristoj.

Sed samtempe ni devas konstati, ke tre certe laborulojn intelekte evoluintajn kaj havantajn larĝajn mondkonceptojn — ni trovos unuavice kaj plej facile inter la klasbatalaj profesiaj unuiĝoj specialaj, similaj al tiuj de la poŝtistoj, instruistoj, teknikistoj ktp.

Tiujn profesiajn unuiĝojn oni devas akceli kaj provi almiliti. Membroj de tiuj unuiĝoj estas ordinare sufiĉe memstaraj por povi memstare juĝi pri la afero, ne atendante juĝon de iuj unuiĝaj aŭtoritatuloj. Tion ni devas profiti.

Oni devas atenti nian malfortecon, kiu malhelpas al ni gvidi nian laboron samtempe kaj kun sama intereseco inter laboruloj diversspecaj. Ni devas atenti, ke plej produktiva tamen estas ne izola varbado kaj altiro de SAT-anoj, sed altiro de certaj grupoj kaj unuiĝoj.

Atentante tion ni koncentrigu niajn fortojn liberajn kaj direktu ilin al unu punkto — al laboro inter laboruloj de — speciale por ni konformaj — profesioj.

Tio nature ne devas ĝeni kaj malhelpi la jam faratan laboron en rondoj aliaj.

Ĉie kaj ĉiam povas aperi specialaj kondiĉoj favorantaj laboron en rondoj kaj medioj aliaj.

Tamen en ĉiuj okazoj, kiam necesos elekti — kien direkti la fortojn liberajn, per tiuj fortoj estu akcelataj la profesianoj kaj profunuiĝoj specialaj, pri kiuj ni jus parolis.

Estus tre interese por ni, tralegi en "Sennaciulo" — opiniojn pri tiu punkto ankaŭ de alilandaj SAT-anoj.

E. Drezen, Moskvo.

Alvoko

La propagandvespero ĉe Moskva Centra Telefon-Stacio (vidu Kroniko n-o 20) havis la sukceson, ke favora rezolucio estis akceptata, kaj studrondetoj malfermiĝis. Ni petas la SAT-anaron, helpi pliprofundigi la sukcesojn konkiritajn ĉe la I. R. H.-organizaĵo (kiu havas ĉ. 1700 membrojn nur inter la gelaboristaro de Moskva Telefon-Stacio) kaj interrilati kun ĝi pro diversaj niaflankaj bezonoj. Krome tiu ĉi organizaĵo bezonas sciigojn pri la vivkondiĉoj de la politik-enkarcerigitoj en viaj landoj, pri viaj vivkondiĉoj, laborista movado ktp. Laŭeble sendu bezonatajn sciigojn laŭ adreso: *Moskvo*, Centra Telefon-Stacio. Al MOPR, aŭ *Moskvo*, Centra Telefon-Stacio. Al Solovjovoj. (Ĉar tiu organizaĵo enhavas la junularan kaj pionir-sekciojn). Viaj gejunularo kaj geknaboj ankaŭ povas havi respektivajn interrilatojn kun ĉi org-aĵo.

Se vi deziras tutmondan triumfon de esp, agu kaj subtenu laŭ devizo: Ĉiuj por unu, kaj unu por ĉiuj! *Ponjatovski.*

DISKUTEJO

Ĉu dikredanto povas esti SAT-ano?

Fakto estas, ke granda nombro da laboristoj havas religian kredon. Multaj inter ili nepre devas havi kredon je dio, se ili ne volas malesperi je la mondo. Tiaj homoj simple bezonas modelon perfektan. Ĉar tia ne ekzistas sur tero, por ili dio estas realaĵo. Ili insistas ne esti idoj de simioj. Por ili la vivo sen kredo ne havas tiom da valoro esti travivata ne sole pro mizero, laborado, batalo, sed ankaŭ pro malsano, malfeliĉo kaj fine morto. Konsiderante tion per sia akra prudento, li ne povas kontentiĝi per la konsolo, ke li daŭrigos vivi en siaj infanoj kaj farinte sian devon dumvivan. Li demandas sin, ĉu efektive ĉio, kion mi efikis dum eble longa vivo, estis vana. Kiel skribis je sia fino Zamenhof: Malsaniĝinte, li ne povas trankviliĝi sin per darvinismo; tiam li devus riproĉi al la naturo, kial ĝi ekipis lin per tiom da prudento, staranta dumvive tiom alte super la besto. Tamen la lasta estas pli feliĉa, nenion sciante pri sia finsorto. La homo sen kredo je eterneco estas la plej bedaŭrinda estaĵo.

La scienculoj ĝis nun ne sukcesis pruvi, ke kreinto ne ekzistas, aliflanke scipovo pri homa spirito estas tre malkompleta, kampo ĝis nun ne sufiĉe esplorita, plej ofte hipotezoj — la sciencaj asertoj.

La SAT-movado, starante sur bazo de la socialismo, malatentas tion. Pro tio multo da laboristesperantistoj ne SAT-aniĝas, nek proletarioj social(ist)iĝas. Socialismo pro tio malhavas grandan batalantaron, eĉ plej ofte kontraŭularon. Se la socialismo volas plenumi sian mision, ĝi bezonas ĉiujn laboristojn.

Nu, ĉu efektive la dikredo estas tiom danĝera al socialismo? Mi asertas, ke ne; monoteisto prave povas esti socialisto, eĉ anarkisto, kion Tolstoj pruvis. Ĉu la socialismo ne agus pli bone, se ĝi konsiderus la religion privata afero por ĉiu kaj lasus feliĉiĝi ĉiun laŭ sia imago? Ne, ĝi ne povas esti indiferenta en tiu afero, ĉar gvidado de religio troviĝas preskaŭ nur en la manoj de servistoj de la posedanta klaso kaj kontraŭsocialistoj. Do socialismo kontraŭbatalu pastraron, kiu estas demagogaro, kaj establu socialistan pastraron. La tezoj de Jesuo neniel kontraŭstaras socialismon, ofte oni aŭdas, ke li estis la unua socialisto. Mi skribas tion supozante, ke la religio tial estas atakata tiom akre de socialismo, ĉar ĝi estas ilo de ekspluatistaro, kiu ja mem nenion kredas. Do oni lernu el ilia taktiko, kreante per proletara religio instrumenton, kiun ĝi pli rajtas fari ol kapitalismo, pro siaj homaraj tendencoj. Tiam socialismo povas montri kaj instrui, ke nur taŭgas jena batalo: liberigi la homaron de ĝia jugo. Kiom longe vi forpuŝos kredantaron el socialismaj tendoj, tiom longe ili rifuĝos al pastraro kapitalisma, kaj ilin ne povas atingi la scio pri kapitalismo. Ili restas malamikoj de ĉi lasta. La batalsagoj trafu la salajratajn servistojn de l'burĝa ŝtato, predikantaj patriotismon, militon, aŭtoritaton. Al ili estu riproĉate, ke mortigo laŭ ordono estas ankaŭ murdo, ke ili nur ŝirmas posedantojn, kaj ke ne povas ekzisti riĉaj kristanoj, se ankoraŭ vivas tiom da mizeruloj.

Mi komprenas, ke homoj ne vidintaj ion alian, ol plej nigran katolikismon, liberiĝinte de ĝi, povas imagi, ke per kristanismo la socialismo povus ion profiti. Fakto estas, ke la unuaj kristanoj vivis efektive komunisme. — Dum pasinta parlamentbaloto prusa samtempe okazis baloto por konsilantaro de evangelia eklezio. La socialista gazeto postulis, ke ĉiu socialisto plenumu ankaŭ en tio sian devon, elektante socialistojn kristanajn, por ke eksiĝu ŝovinistaj konsilantoj, kio pruvas, ke socialismo devas antaŭe konsideri religion, kaj iam ĝi devas akcepti ĝin.

Ĉu iu imagas, ke Soveta Rusio povus forigi la religion? Certe eklezio kaj sovetio adaptiĝos unu al alia pri demandoj konsciencaj. — La socialismo zorgu, ke ĝi disvastiĝos la verajn tendencojn de la doktrino de Jesuo, tiam ĝi plenigos siajn vicojn, finvenkos, savos kredantaron el la ungegoj de pastraro, kaj neniu povos riproĉi al ĝi, ke estante socialisto li havus konflikton kun sia animo.

Friedr. Gauch, Frankfurt a. M.

Fariĝu ĉiu el vi lab. korespondanto! Kiamaniere?

Multaj el niaj kamaradoj, havante la bonan volon fariĝi lab. korespondantoj kaj provizi "Senn"-on per taŭga materialo, ne scias kiel plej bone fari. Jen, kion la redakcio bezonas, kaj kion ĉiu bonvolulo povas liveri:

Ni ne *deziras: teoriajn artikolojn, rezonadojn, diskutojn pri filozof-religiaj temoj, proponojn pri aferoj ne efektivigeblaj de ni kaj tial nediskutindaj, aŭ netuŝantaj nian faklaboron.*

Ni deziras: informecajn artikolojn pri lab. movado vialanda, viadistrikta, vivkondiĉoj de lab-istaro, strikoj, bataloj ktp., pri hejma vivo, se ĝi karakterizas specialaŭ laboristan situacion en iu loko; konsilojn, se ili estas praktikeblaj kaj servas nian faktecan laboron. Se okazas en via regiono io aktuala, kio rilatas lab-istaron, ĉu temas pri minkatastrofo, persekutoj, arestoj aŭ io alia, ni petas tujan raporton. Ni eĉ akceptas nelerte verkitajn, abruptajn, malkompletajn, telegrafstilajn raportetojn, se ili pridiras ion gravan, menciindan.

Respondeca pri la vero de l' sciigoj laŭ sia konscienco estas ĉiu SAT-korespondanto.

Grava Enketo

La pedagogia sekretario de Eduk-Intern jus publikis jenan cirkuleron petanta informojn de ĉiulandaj instrulaboristoj aŭ kompetentaj kamaradoj.

SAT-anoj vi nepre respondu per esp.o (akceptata de Eduk-Intern) aŭ petu informojn de instruista k-do.

I Lernejaj konsilantaroj

Ĉu ekzistas en via lando *gepatraj* kaj instruistaj konsilantaroj? Informu pri:

a) ilia konsisto kaj elekto
b) iliaj taskoj kaj povoj
c) iliaj agado kaj rezultatoj.

II Kritiko de lernolibroj

a) Ekzamenu la lernlibrojn plej uzatajn en via lando (pri legado, poezioj, kantoj, historio, geografio, moralo) kaj ankaŭ la oficialajn instrukciojn kaj programojn por elmontri ilian nacionalismon kaj burĝklasan ideologion.
b) Sendu studojn jam pri tiu temo verkitajn en via lando.

III Kontraŭ religia instruado

a) Kiel sin tenas la aŭtoritatuloj de via lando rilate al:
1. la religia instruado en ŝtatlernejoj
2. la lerninstitucioj de religiaj sektoj.

IV Laboristaj infangrupoj

Kiuj organizajoj starigis infangrupojn proletariajn? Kian agemon montras en ili la instruistoj, la gvidantoj? Sendu ĉion al:

Maurice Van de Moortel
pedagogia sekretario de Eduk-Intern
rue Joseph Stevens, Bruxelles (Belgio).

KRONIKO

Britio

London. Ĉe kunveno de Lab. Esp. Klubo k-dino Suĵadinova parolis pri K. Liebknecht kaj samtempe pritraktis la persekuton de niaj alilandaj k-doj. Pro ŝia alvoko ni sukcesis kolekti 15 ŝil. kiujn ni sendis al la Intern. Klasbatala Suferant-Helpo (brita sekcio). *3398.*

Manchester. Post kiam BLES-anoj aliĝis al SAT-grupo, tiu kreskis kontentige. Dum la unua oficiala kunveno estis elektitaj k-do *Frank Elder* kiel estro, k-dino *France* sekretario, k-do *L. Rosenbloom* bibliotekisto. Aranĝo de nord-angla SAT-konferenco decidita por junio. Dum 1 majo publika propagando intencita. Reklamfolio nacilingva estos presita. Spacon en du novaj maldekstraj gazetoj oni petas. Fremdaj vizitontoj, SAT-anoj, turnu sin ĉiufoje al k-do *Elder*, 36 Brunswick St., *Altrincham ap. Manchester.* (Tio rilatas tutan Brition). *B. F.*

Sovet-Unio

Gomel. Estas organizita gub. filio de SEU. Societo vigle laboras. Esp-o havas grandan sukceson en lab. medioj. Unuan tagon sin anoncis 60 k-doj dezirantaj lerni esp-on. En proksimaj tagoj malfermiĝos kursoj. Ĉefan laboron faras k-do M. Polsemen. *M. P.*

Kalaĉ. En nia provinca urbeto esp. estas tute nova. En marto 24 kelkaj memstare komencis studi la lingvon. Dum festvespero 12. dec. k-dino Ermilova faris unuan raporton pri esp. kaj IRH. Ĉeestis 400 personoj. Dufoje en loka murgazeto sindikata aperis art. — Pro dombrulo de klubo laboro provizore ĉesis. Nur 23. jan. k-do Ĉerenkov faris lekcion pri esp. Ĉeestis 70 p. Laste estis organizita iniciativa grupo, kiu varbis por fondo de Societo de esp-istoj. Dezirantaj troviĝis 120 p. La Societo nun funkcias sur platformo de SEU kaj SAT. En kurso de Part-Sindikata Klubo partoprenas 50 p., krom tio k-do Ĉerenkov instruas 30 infanojn en infandomo. *4093.*

Usono

Fondiĝis Nord-Amerika Laborista Asocio kun provizora centra oficejo en Rockford, Ill. La nov-yorka grupo de 24 membroj aliĝis. La asocio estas gvidata de SAT-anoj. *G.S.*

Estu preta!

Gejunuloj de ĉiuj landoj! Ĉu vi scias, ke junaj pioniroj en Odessa en kunveno de 25. 2. 1924 decidis unuanime: "Ĉis la oka datreveno de Oktobra Revolucio devas esti neniu pioniro nescianta esp-on, por ke ĉiuj senpere povu komunikiĝi kun siaj eksterlandaj kamaradoj"?

Tial ni, gepioniroj de Laborlernejo n-o 50, lernante jam esp-on deziras komunikiĝi kun gekamaradoj de la tuta mondo. Ni petas ĉiujn skribi al ni pri junulaj organizaĵoj, pri junula kaj geknaba vivo, lernado, laboro, novaj moroj, sporto, ekskursoj, someraj tendaroj ktp. Sendu fotografaĵojn, desegnaĵojn, vidaĵojn el via vivo.

Ni niavice reciproke sendados al vi la samon el nia vivo.

Ni bezonas esperantaĵojn por legado kaj lernado ankaŭ por propaganda ekspozicio.

Ni alvokas ĉiujn gejunulojn senprokraste decidi pri ellerno de esp.o. Al nia "Estu preta" ni aldonu "Lernu esperanton", ĉar sendube per esp.o ni pli rapide atingos nian celon.

Adreso: Esperanta grupo de pioniroj
gvidanto *V. Vozdviĵenskij*
Ŝkola n-o 50 Konnaja 46 *Odessa* USSR.

Lingvaj demandoj

Pri la landnomoj[1])

K-do Botvinkin tute pravas, dirante, ke la solvo proponita de la ianoj ne estas iel pli bona ol la solvo de la ujanoj. Efektive, ĉar la esenca kaj precipa kondiĉo de internacia lingvo estas la facileco, kiu necesigas logikecon, simplecon, unuformecon, senesceptecon, tial la kerno de la demando kuŝas ne en la elekto de ia sufikso, sed en la forigo de la duobla formado de landnomoj, el kiuj unuj estas sensufiksaj, dum aliaj estas kunsufiksaj. La sola logike kaj praktike taŭga rimedo por unuformigi tiun formadon estas, samkiel proponas k-do Botvinkin, la sensufiksigo de *ĉiuj* landnomoj kaj la sufiksigo de *ĉiuj* nomoj de nacianoj. Laŭ la ekzemplo de la naciaj lingvoj oni montras la loĝanton ne per aparta sufikso, sed per la simpla, tute klara kaj oportuna esprimo: loĝanto en.

Ĉiu ajn landnoma sufikso estas forjetinda ne nur ĉar senutila, sed ankaŭ ĉar ne ĝenerale internacia. La aserto, multe ripetita, sed nesufiĉe kontrolita, ke i- estas sufikso internacie ĝenerale uzata por montri landnomojn, estas neĝusta, ekzemple: England (angle, germane, svede), Angleterre, Inghilterra, Inglaterra (hisp., port.), Angolorszag; Switzerland, Schweiz (germ., svede), Suisse, Svizzera, Suiza, Suissa; Sweden, Schweden, Suède, Sverige; France (angle, france), Frankreich, Frankrike; Denmark, Dänemark, Danemark, Danimarca, Dinamarca, Danmark; Greece, Griechenland, Grèce, Grekland, Hellas; Norway, Norwegen, Norvege, Norge (svede, norv., dane), Noruega, Norsko; Poland, Polen (germ., dane, norv., svede) Pologne, Polsko, ktp. Plie, oni nesufiĉe rimarkis, ke la sufikso i estas, en plejmultaj lingvoj, kiuj uzas ĝin, tre diverssenca kaj tre konfuziga, ĉar ĝi montras ne nur kelkfoje kontinenton aŭ regnon aŭ provincon, sed ankaŭ ofte multajn aliajn aferojn: scienco, arto, propra nomo de virino, abstrakta kvalito, abstraktaĵo, rezulto de la ago, aro aŭ kolektivaĵo, profesio aŭ metio, ejo, ktp.

Pri la plejmulto de la landnomaj sensufiksaj radikoj, la internacieco estas facile videbla kaj la elekto glata: Itali-o, Rusi-o, Siberi-o, Turki-o, Rumani-o. Germani-o, Litovi-o, Englando, Nederlando, Finnlando, Egipto, Perso, Portugalo, Ĉino, Japano ekzemple estas tute bonaj kaj la devenigitaj nomoj de nacianoj estas ofte internaciaj: Itali-ano, Rusiano (angle: russian; france: grand-russien), Turkiano, Rumaniano Germaniano, (angle: german-ian), Nederlandano, Englandano, Finnlandano, Egiptano, Persano, Portugalano, Ĉinano, Japanano. Al tiuj, kiuj trovas, ke kelkaj kunsufiksaj nacianaj nomoj estas iom longaj, oni povas respondi, ke mallongeco de la vortoj, kvankam dezirinda, tamen ne estas esenca kaj precipa kondiĉo de lingvo internacia, kaj ke simpleco kaj unuformeco estas multe pli gravaj kvalitoj.

Ĉar plej ofte aŭ eĉ tute ne ekzistas la litero i en la nacilingvaj formoj, kiujn la ianoj tradukas per Svisio, Svedio, Francio, Anglio, tiuj ĉi formoj estas forjetindaj kaj anstataŭindaj per la vere plej ĝenerale internaciaj seniaj formoj: Sviso (Svislando estas germana kaj angla, sed tute ne internacia formo), Svedo, Franco, Englando.

Restas nur seso aŭ sepo da radikoj, pri kiuj oni povas heziti; tamen la interkonsento estos ebla, se nur oni komparos la diversajn nacilingvajn formojn kaj atentos pri la relative pli internaciaj: Spanio, Grecio (la formo Grekolando, kiun uzas, oni ne scias kial, plej multaj el la ianoj, estas nur germana, sed tute ne internacia), Polno, Danmarko, Belgio, Aŭstrio.

La sensufiksaj nacianaj nomoj devas esti rezervataj por signi la antikvajn kaj praajn gentojn: Angloj (the Angles, les Angles, die Angeln), Belgoj, Germanoj, Frankoj, Grekoj, Danoj. *Lowo.*

1) Vidi antaŭan n-on.

I. T. F.

Internacia Fervojista Kongreso

okazos laŭ sciigo de l'I. T. F. de 30. junio ĝis 2. julio en Bellinzona. I. a. estas farita propono de Deutscher Eisenbahner-Verband pri ratifikado de la Vaŝingtona konvencio pri okhora labortago.

Al la *Intern. Transportlab. Federacio* aliĝis dum la pasinta jaro 14 novaj asocioj, inter ili 5 fervojistaj kun ĉ. 80 000 anoj, 5 transportistaj kun ĉ. 20 000 anoj kaj 4 maristaj asocioj kun ĉ. 60 000 anoj. Jam en jaro 1925 alvenis 3 aliĝ-petoj. Neniu organizaĵo depost la restarigo (1919) eksiĝis. 2 asocioj devis esti eksigataj, la itala marista unio pro siaj rilatoj al la faŝistoj kaj la holanda transportista federacio pro kontraŭorganiza konduto.

VARBU NOVAJN ABONANTOJN!

Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo

2] *G. Brojdo*

Kie ajn kaj kiam ajn aperis nacio, tiu ĉi nova formo de unuiĝo elkreskas sur bazo de novaj ekonomiaj interrilatoj, naskataj de aperanta kapitalismo, eĉ kvankam en la formo de komerca kapitalo. Kia do estas la diferenco inter tribo, gento kaj nacio?

Tribo, gento, nacio prezentas diversajn formojn de homa socio, konformajn al diversaj gradoj de ekonomia disvolviĝo de homaro.

Kolektado de vegetaĵoj, fiŝkaptado kaj ĉasado kun pratempaj embrioj de kulturado de kelkiuj vegetaĵoj kaj bredado de bestoj — jen la ekonomia bazo de tribo.

Firma, enfermiteca natura brutedukada aŭ terkultura mastrumo, aŭ la miksita mastrumo estas la ekonomia enhavo de genta organizo.

Disvolvita interŝanĝo sur la bazo de vara mastrumo, kapitalista mastrumo, estas la bazo por apero kaj disvolviĝo de nova formo de homsocia unuiĝo — de la nacio.

2. Kiel kaj kial aperas kaj disvolviĝas nacio?

Se ni komparos kunmetiĝantajn en nacion kirgizojn kun germana nacio en epoko de Bismarck (70aj jaroj de la pasinta jarcento), ni vidos grandan diferencon. Tio signifas ke, foje aperinte, la nacio disvolviĝas kaj ĝia disvolviĝo iras paralele kun disvolviĝo de kapitalismo.

Embriojn de nacio ni vidas jam tie, kie estas ĵus aperanta la unua stadio de kapitalismo, kvankam komerca. Apero, eĉ en malforta formo, de komercaj interrilatoj inter arabaj gentoj de VI.—VII. jarcentoj aperigis movadon por nacia unuiĝo. Kreiĝis, kvankam negrada, embria komerca burĝaro, kiu estis klasa portanto de tiu ĉi movado, de la novaj ideoj.

Kaj ne hazarde gvidanto de tiu ĉi movado — Mahometo — estis administranto de granda, por tiu tempo, komerca entrepreno, aranĝinta karavanan komercon inter Meko kaj Medino.

La neceso aranĝi komercajn vojojn inter diversaj gentoj, garantii ĝustecon de komercpagoj postulis unuecon de leĝoj, de moroj kaj detruon de la pratempa sistemo de disigiteco inter gentoj. Unu dio devis, konforme al la novaj interesoj, gvidi kaj mekanojn kaj medinanojn. Sed tiu ĉi nacia unuiĝo estis malforta, en plena konformeco al la tiama stato de kapitalismo.

Sed komercaj interrilatoj disvolviĝas, aperas vara mastrumado, formiĝas industria kapitalo, kaj ĉi tiuj novaj formoj de kapitalismo kreas klason de kapitalistoj, okupantaj en la socio pli kaj pli gravan lokon. Agadkampo de burĝaro larĝiĝas, ĝi plenumas insistan laboron por nacia unuigo. Ĝi adaptas por siaj klasaj interesoj scienculojn, libron, gazeton, teatron, pentrarton, kaj per granda aparato de potenca influo sur vastajn popolamasojn ĝi entiras ilin en lukton kontraŭ ekonomiaj kaj politikaj baroj sur la vojo de disvolviĝo de kapitalismo.

Ĝi disrompas restaĵojn de la feŭda mastrumado, ĝi detruas internajn barilojn, konstruitajn de feŭdoj; — apartajn ŝtatetojn, doganbarojn. Ĝi kunforĝas la dispecigitajn partojn per ŝtala linio de fervojoj, per akvovojoj, ĝi kreas siajn potencajn sociajn organizaĵojn, subigas al siaj interesoj malnovan registaron de feŭdoj aŭ forigas ĝin, entirinte en la revolucion vastajn amasojn de laboristoj kaj kamparanoj. Ĝi utiligas almilititan de ĝi ŝtatan aparaton por nacia unuigo, por kreo de potenca burĝa ŝtato. Tiel dum la granda franca revolucio finiĝis formiĝo de franca nacio; tiel rezulte de la venka milito de 1870—71 jj. finiĝis formiĝo de germana nacio, la saman vojon trairis la historio de apero, de disvolviĝo kaj de finformiĝo de itala nacio ktp.

La vojo de disvolviĝo de kapitalismo estas samtempe ankaŭ la vojo de disvolviĝo de nacio.

Tial al la metita supre demando necesas respondi: nacio aperas kaj disvolviĝas tie, tiam kaj tiomgrade, kie, kiam kaj kiomgrade aperas kaj disvolviĝas kapitalismo.

Ĝi aperas kaj disvolviĝas tial, ke tiu ĉi formo de socio konformas al la klasaj interesoj de disvolviĝinta surbaze de kapitalista socio burĝaro, kiu samtempe estas portanto de ĉiuj naciaj movadoj en la epoko de disvolviĝo de kapitalismo.

3. Ĉu la nacio estas fenomeno progresiva aŭ reakcia?

Jes kaj ne.

En tiu periodo de la kapitalisma disvolviĝo, kiam burĝaro en siaj klasaj interesoj batalas kontraŭ la feŭde-servuta sociordo, kontraŭ la enfermiteca natura mastrumado, kontraŭ la politika disigiteco kaj dispecigiteco, ĝi plenumas objektive progresivan aferon. Kreata de ĝi nova nacia socio akcelas disvolviĝon de produktaj fortoj en la popola mastrumado, entiras en la socian lukton popolajn amasojn, altigas konforme al la novaj formoj de tekniko kulturon de popolamasoj, ĝi batalas kontraŭ jarcentaj superstiĉoj — heredaĵo de la pasinto ktp. ktp.

(Daŭrigota) Elrusigis *P. Jakovlev.*

DIVERSAĴOJ

Nova internacia movado

Ekzistas en la mondo nova movado internacia, kiu estas tiel disvastigita en la mondo, ke preskaŭ ne ekzistas loko, en kiu ne estus anoj de tiu movado. Ĉiuj anoj havas la saman ag- kaj pensmanieron kaj penadas tiun movadon pligrandigi. Vi opinias, ke mi parolas pri esperanta movado, sed vi eraras kaj tuj mi diras — se vi estus scivolema — ke mi neniam perfidos kian movadon mi opinias. Mi nur intencas priskribi la agmanieron de la anoj.

La movado mem kreskas terure kaj nur pro tio, ĉar ĝi havas multe pli facilajn taskojn ol esperanta movado — ili ne devas instrui lingvon aŭ disrompi siajn kapojn per lernado de vortoj aŭ gramatiko. Estas bedaŭrinda fakto ke tiu movado pli malutilas ol utilas al nia movado, ĉar homoj kiuj certe povus esti gajnotaj por ni, nun ne havas tempon por lerni.

La anoj kunvenas ne multnombre, ofte ili estas ankaŭ unuope kaj se ili deĵoras ili havas sur la kapo orelvarmigilojn kaj sidas apud la tablo, sur kiu estas metita kesteto aŭ io simila. Tiam ili sidas kvazaŭ ridigite — iliaj rigardoj kaj mienoj almenaŭ tiel aspektas — kaj ve, al tiu malbonulo, kiu hazarde movas la piedojn, tuj ĉiuj anoj levas la brakojn kaj minacas per la montra fingro aŭ per pugno. La plej granda parto de tiuj anoj boras per malgranda spiralo en iu ŝtono, sed vi povas esti konvinkita, ke la truo neniam estos finita. Tiun vanan laboron ili treege ŝatas, ĉar ili tion ĉiam faras. Kiel mi aŭdis, ĉiu homo povas esti ano de tiu movado, se li nur havas orelojn — cerbon li ne bezonas.

Tiu movado estas ankaŭ la unua, kiu aŭdas "kolore", ekzemple ekzistas kelkaj, kiuj aŭdas nigre. *2135.*

AĈETU AKCIOJN!

Klarigo. Multaj demandis niajn moskvajn k-dojn, kion signifas la "Berlina Internacio", aludita en intervjuo kun k-do Purcell (S.-11). Por informo servu, ke ĝi estas la Internacio de la sindikatista anarkista laborista unio, fondita antaŭ nelonge. La nomo Berl. Intern. ne estas oficiala, sed ĝenerale uzata samkiel ekz. 2½. Internacio k. s. Ĝi eldonas esp. lingvan informbultenon por sia gazetaro.

Sennacieca Asocio Tutmonda

*Asocia Sidejo: 23 Rue Boyer, Paris-XX^e^*
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz — poŝtĉeka n-ro 6835

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

Punafranko. Dum lasta tempo multfoje okazis, ke la kamaradoj siajn leterojn al redakcio kaj administracio ne sufiĉe afrankis. Ĉar ni neeble povas elspezi tiujn senutilajn punmonojn el la SAT-kaso, ni lasas reiri tiujn sendaĵojn kaj atentigas ĉiujn, akurate afranki la poŝtaĵojn.

Ekspedado. Ĉar kelkaj malmultaj k-doj plendis ĉe ni pro nericevo de la gazetoj aŭ malregula ricevo, ni rimarkigas, ke ni ekspedas la gazeton ĉiam tute precize kaj regule je sama semajntago al ĉiuj kiuj estas rajtigitaj ricevi la gazeton. Do en okazo de malreguleco ne ni, sed la poŝto kulpas. Pri abonfiniĝo ni avertas nun jam ĉe la antaŭlasta numero la abonantojn, por ke ili havu sufiĉe da tempo por reordigi la aferon. Esceptojn en tiu ĉi rilato ni ne povas fari ekz. plilongigi arbitre iun abonon post la promeso de estonta pago, seninterrompe liveradi ne havante sciigon pri reabono ktp.), ĉar tiam kontrolo niaflanke estos tute neebligita, kaj la aeministra laboro malfaciligita kaj la plenumado ekzakta de l'gazetliverado ktp. malglatigata. Ni petas la k-dojn, noti tion. Aliaj entreprenoj cetere ne agas alie, kvankam ili havas pli ampleksan administran aparaton ol ni (ekz. "Heroldo de Esperanto", n-o 14, tria paĝo, pri abonfiniĝoj). Do, estas petata via indulgemo kaj precizeco en la kotiza kaj abonpaga afero.

Eldona fako. Ni atentigas refoje pri la kooperativa karaktero de nia entrepreno kaj pri la eldonitaj du serioj de akcioj (por unu kaj por duona dolaro), kies vendo sole garantias al ni la eblecon, daŭrigi la libroeldonadon, ĉar la librovendo ne funkcias tiel glate kaj flue, kiel estus dezirinde.

Municio por SAT kaj ĝiaj organoj

Afriko: 3998-Loanda, 4,70 esk. 1.19 mk. **Aŭstrio:** Sonnenfeld-Wien, 20000 kr.; Schwaiger-Salzburg 6000 kr.; k-dino Schober-Wien, 0,50 mk. **Francio:** Cachon-Paris 3 fr. fr.; n-o 1-Paris, 19,35 fr. fr.; 1370-7,58 fr. fr.; Dumont-Toulouse, 3 fr. fr.; Aubry-Reims, 2 fr. fr; **Germanio:** Huster-Essen, 1.— mk; Wagner-Pasing, 1,18 mk. **Italio:** Baldi-Milano, 3 lir; **Japanio:** Saitoo-Kioto, 1,50 mk. **Sovet-Unio:** Djakov-Voronej, 0,25 r.; Kuzin-Taŝkent, 0,20 r.; Sariĉev, Dzetovecki, Rudenko, Bogopalski-Astrahan, po 0,50 r.

RECENZEJO

Gazetoj

Represis artikolojn el Senn. kaj S. R.: Komuna, Samara, 31. jan., Ĉina pop. k. SSSR. (S. 15). La Vie Ouvrière, Paris, 6. febr., Intern. atako kontraŭ 8-hortago. Vapaus (finna kanada ĵurn.) 5. febr., Kom. infanorg-aĵoj en Ukrainio (SR. dec.).

Enpresis div. artikolojn: Naŝ Putj, Kremenĉug, 7. febr., esp. k. prol. de Izgur. Le Reveil Ouvrier, Nancy, 7. febr., deklaracio de Nathans.

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas – Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.

Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej.; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ ¼ jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG